WIKIPEDIA

Sangoa lingvo

La **sangoa** estas la oficiala lingvo de la Centr-Afrika Respubliko. Ĝi estas parolata de nur 400.000 homoj kiel la unua lingvo, sed oni taksas ke kelkaj milionoj parolas ĝin kiel duan lingvon, pro ĝia statuso kiel interlingvo tra la lando. Ĝi estas bazita sur la lingvo de la tribo Sanga, sed ĝi enhavas multajn francajn vortojn.

ISO-lingvokodo :

639-1 = sg
639-3 = **sag**

Pro la rapida kresko de Bangui, la ĉef-urbo de la Centr-Afrika Respubliko, ekde la sesdekaj jaroj, la Sangoa lingvo multe plivastiĝis, ĉar la filoj de enmigrintoj de aliaj regionoj kreskis parolante ĝin kiel denaskan lingvon. Tamen, en oficialaj kuntekstoj oni ankoraŭ preferas uzi la francan.

Ekzemploj

Vorto	Traduko	Norma prononco
tero	sesé	
ĉielo	nduzu	
akvo	ngu	
fajro	wa	
viro	koli	
virino	wali	
manĝi	tè	
trinki	nyon	
granda	kota	
malgranda	ketè	
nokto	bi	
tago	la	

Eksteraj ligiloj

- http://sango.free.fr
- http://sango.ti.laso.free.fr
- http://sango.free.fr/bkr_lendo.htm
- http://web.archive.org/web/20050410003521/http://www.ling.lu.se/disseminations/pdf/44/Thornell.pdf

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Sangoa_lingvo&oldid=6117323"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 16:34, 1 mar. 2017.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.